

# KOMUNIKOJ

TRIMONATA BULTENO DE SPIRITISMA ELDONA ASOCIO F. V. LORENZ  
Jaro 41-a BRAZILIO, OKTOBRO-NOVEMBRO-DECEMBRO 2017 N-ro 168

“Amu vian Dion per via tuta koro kaj per via tuta animo kaj per via tuta menso kaj vian proksimulon kiel vin mem.”  
JESUO (*Mt*, 22:37-40).

“Neskuebla fido estas nur tiu, kiu povas rekte rigardi la racion en ĉiuj aĝoj de la homaro.”  
KARDEC. *La Evangelio laŭ Spiritismo*.  
Ĉap. 19, §7.

“Sur neŭtrala lingva fundamento, komprenante unu la alian, la popoloj faros en konsento unu grandan rondon familian.”  
ZAMENHOF. *La Espero*.

## La Afableco

Zita Flora de Almeida



En mesaĝo el la 9-a ĉapitro de “La evangelio laŭ spiritismo”, la Spirito Lazaro faras konsiderojn, kiuj devas konduki nin al la ekkonado de la spirita progreso, kiun ni atingas ĉe niaj ĉiutagaj situacioj: “La mondo estas plena de tiuj personoj, kiuj estas dolĉaj, kondiĉe ke neniu ilin kolerigu, sed kiuj mordas je l’ unua kontraŭaĵo”. Kaj poste: “Ne sufiĉas, ke el la lipoj fluas lakto kaj mielo; se la koro ne partoprenas en tio, estas nur hipokriteco”.

La afableco estas konstatata kiel nepra kvalito por feliĉa kunvivado en la familio kaj en la socio. Estas nenio pli korekta ol tio!

Tamen, afablaj sintenoj povas esti nur socia “ŝmiro” por doni pli da ĉarmo kaj simpatio al la persono, se ili ne estas spontanaj kaj kutimaj, do, aŭtentika esprimo de la animo, kiu ne koleras eĉ kiam li vidas kontraŭataj siajn intencojn, aŭ kiam, tute simple, iu malkonsentas pri liaj vidpunktoj.

La natura stato de sereneco kun amemo, eĉ en situacio de defio, estas evidenta signo de spirita progreso, rezulto de valoraj konkeroj de la senmorta estaĵo, kiel, ekzemple: komprenemo, ĝentileco, sincereco, bonvolemo, kvalitoj, kiuj donas al la estaĵo ian emocion stabilecon, kiu ne ŝanceliĝas pro la aliulaj malekvilibroj, nek pro la malfacilaĵoj de la surtera marŝado, se oni ilin konsideras naturaj kaj edukaj, en

mondo de elacetoj kaj provoj, kiel la Tero, kie ni ĉiuj estas subigitaj al procedoj de polurado, kun pli grandaj aŭ pli malgrandaj malfacilecoj, emociaj kaj spiritaĵoj.

La bonvolemo kaj toleremo al la proksimulo, kiujn Jesuo tiel ofte rekomendis, igas nin pli facile kompreni la homajn nekonformecon kaj la individuajn malsamecojn, rekonante, ke la efektiva malbono estas ja tiu, kiu venas de nia propra animo, kaj ne de ekstere.

Ni havos grandan profiton, kiam ni intence kaj senĉese praktikos la ĝentilecon kiel esprimon de fratamo, ekde la malgravaj agoj ĉe la familia kaj socia intimecoj, kiel ekzemple: ĉiam bonhumore saluti; danki kaj reciproki malgrandajn komplezojn; kiam oportune, atentigi pri la bonaj kvalitoj de la personoj; cedi lokon al tiuj, kiuj pli bezonas ilin, kaj silenti por minimumigi konfliktojn.

Jam diris la Amika Spirito, ke la ĝentileco, evidentigata kiel vera frateco “estas filino plej amata de la rezigno, kaj ĝi intime nutras la kapablon ĉion transformi en senfinan bonfaradon”.

Ni estos feliĉaj, se ni utiligos/uzos, ekde nun, ĉi tiun ekzistadon por kulturi tiel gravan konkeron de la koro.

Per tio ĉiuj homoj scios, ke vi estas miaj disĉiploj, se vi havos amon unu al alia. Jesuo (Johano, 13:35)

(Esperantigis: Benedicto Silva)

**Eurípedes Alves Barbosa**



Eurípedes estas aktiva brazila spiritisto-esperantisto, verkisto, preleganto kaj konstanta kunlaboranto de Komunikoj kaj Almanako Lorenz.

Koran dankon, kara frato, pro via senrezerva apogo al nia Eldonejo!

**K**araj gelegantoj,  
Ankoraŭ kunĝuantaj la kristnaskan etoson, surbaze de jaro plena je laboroportunoj, ni disponigas al vi plian eldonon de Komunikoj, enhavantan mesaĝojn, informojn, poezion kaj omaĝojn.

Ni esperas, ke 2018 estos ankoraŭ pli fruktodona por ni ĉiuj en la nobla tasko diskonigi la idealojn de Esperanto en la konstruado de iu mondo pli justa, humana kaj frata.

Per Komunikoj, Eldonejo Lorenz portas al siaj legantoj kaj kunlaborantoj la certecon pri tio, ke ni iras sur la vojo de la bono kaj ke, kunmarŝantaj, ni povas atingi multe pli, laŭ la instruoj, kiujn Jesuo heredis al ni.

Bonan legadon!

**“Nu, ni portu la verdan standardon  
kiel simbolon de la unuiĝo!**

**Kiu ajn estu nia aĝo, ni lernu!**

**Kvankam nekomprenataj, ni iru antaŭen!**

**Ni persistu ĝojaj!**

**ESPERANTO signifas ‘tiu, kiu esperas.’**

**Marŝante kaj servante, kredante**

**kaj semante, ni trankvile esperos.”**

(LORENZ, Francisco Valdomiro [Mediumo Francisco Cândido Xavier]. “Esperanto kiel revelacio”. Rio de Janeiro: Lorenz, 2015.)



## LORENZ

### “KOMUNIKOJ”

TRIMONATA BULTENO DE LORENZ – SPIRITISMA ELDONA ASOCIO F. V. LORENZ

Fondita la 15-an de decembro 1975

Jaro 41-a – n-ro 168 | Oktobro-Novembro-Decembro 2017

Interreta kaj papera senpagaj eldonoj  
Ĉirkaŭ dudek mil legantoj en la tuta mondo

#### KONTAKTIĜU KUN NI KAJ ALIĜU:

Spiritisma Eldona Asocio F. V. Lorenz  
Rua Francisco Vale, 57 Engenheiro Leal  
21370-171 Rio de Janeiro-RJ – Brasil (Brazilo)  
Telefonaĵoj: + 55-21-2452-9039 - + 55-21-2450-4768  
Skajpo: Lorenz Editora | Fejsbuko: Editora Lorenz | Retadreso: editora\_lorenz@uol.com.br  
Retpaĝo: <http://editoralorenz.blogspot.com.br>



Kompostita de Rogério Mota

# Kuriozaĵoj el la leteroj de Zamenhof



Al s-ro R-i

Estus tre bone, se Vi donacus po unu aŭ po kelkaj lernolibroj de nia lingvo al la kluboj aŭ societoj, kiuj ekzistas en Via urbo, kaj se Vi zorgus, ke la lernolibroj kuŝu sur la tabloj en la legejoj de tiuj ĉi kluboj. Tion ĉi saman estus bone fari ankaŭ kun la bibliotekoj.

Al s-ro K. en Dinaburgo

Ekster la respondo letera, ni poste donos al Vi ankaŭ pli vastan respondon en nia gazeto. La respondoj en la gazeto havas karakteron ne personan, sed komunan; tial respondinte al la demandanto mem per mallonga poŝta karto, ni ofte, se la demandata objekto ne estas tre grava, donas la respondon en la gazeto kelkajn monatojn pli poste, ol la demando estis farita.

Al Max Muller

Alte estimata Sinjoro Profesoro!

Mi sendas al Vi kolekton da libroj en la lingvo internacia "Esperanto". Mi petas Vin humile, Sinjoro Profesoro, akcepti ilin kiel signo de mia profunda estimo al la glora maestro kaj patro de la lingva scienco.

(Fonto: "Tom Reviziita Plena Verkaro de L. L. Zamenhof". Originalaro 1. Unua etapo de Esperanto – 1878-1895. Eldonejo Ludovikito, 1989.)

## ESPERANTISTINO FAROS EKSPOZICION EN LISBONO

Eurípedes Alves Barbosa

**D**alvani da Silveira ekspozicios siajn pentraĵojn en Lisbono, Portugalio, de la 14a ĝis la 18a de novembro 2017. Ŝi laboras vigle pentrante homajn figurojn, fruktojn, florojn kaj pejzaĝojn per belaj kaj vivaj koloroj.

Dalvani naskiĝis en la urbo 'Candiba', ŝtato Bahia, la 21an de novembro 1956, kaj loĝas en Braziljo ekde kiam ŝi estis deksepjaraĝa. Dalvani estas edzino kaj havas kvar filojn kaj kvin nepojn.

Ŝia patro estis amatora muzikisto, tajloro kaj ŝuisto. Dalvani diras, ke, en sia infaneco, la belaj muzikoj luditaj de ŝia patro, pere de akordiono, plenigis ŝian koron de revo kaj espero, kaj tio ege kontribuis al ŝia interesiĝo pri arto.

Dalvani estas fervora spiritisto kaj aktiva esperantisto. Ŝi lernis Esperanton de la paro Darci/Terezinha Sardinha, ĉe Spiritisma Societo Allan Kardec, situanta en la satelita urbo 'Brazlândia', Federacia Distrikto.

Dalvani estas publika funkciulo kaj baldaŭ emeritiĝos.



Foto de Dalvani kaj la afiŝo pri ŝia ekspozicio

### SENPAGAJ LIBROJ...

Ĉiuj kiuj loĝas ekster Brazilo rajtas ricevi niajn librojn, en Esperanto, tute senpage. Sufiĉas nur sendi vian kompletan nomon kaj poŝtadreson al [editora\\_lorenz@uol.com.br](mailto:editora_lorenz@uol.com.br)



LORENZ

**KUNLABORU!** – Membriĝu ĉe ASOCIO LORENZ kaj helpu la disvastigon de Esperanto kaj Spiritismo en la tuta mondo!

**COLABORE!** – Torne-se membro da ASSOCIAÇÃO LORENZ e auxilie a divulgação do Esperanto e do Espiritismo em todo o mundo!

# NI LABORU!

Al mia kara nevo Ismael Gomes Braga

Spirito: Abel Gomes

Mediumo: Francisco Cândido Xavier

Ofte dum ripozaj miaj horoj,  
de la mens' tra l' pordoj malfermitaj  
ekaperas, bildoj subitaj,  
pri l' surtera vivo rememoroj.

Mi revidas l' aron da laboroj,  
por la Ideal' de ni faritaj;  
multaj semoj estas ja perditaj,  
sed ekĝermis iuj en homkoroj.

Sur la ter' rikolton mi ne vidis,  
sed persistis, ĉar min Dio gvidis,  
kaj mi ĝojas kore tie ĉi,

via ke laboro fruktojn donas,  
kaj kun Zamenhof mi vin admonas:  
ĉiam kun persist' laboru ni!

Muitas vezes nas minhas horas de repouso,  
às portas abertas da mente,  
ressurgem-me, em súbitos quadros,  
recordações da vida terrena.

Revejo, então, o conjunto de trabalhos  
que fizemos pelo Ideal, na verdade,  
muitas sementes estão perdidas,  
mas algumas germinaram em corações humanos.

Sobre a terra não vi a colheita,  
mas persisti, porque Deus me guia  
e aqui eu sinto o coração alegre,

teu trabalho está produzindo frutos,  
e com Zamenhof eu te repito:  
com perseverança trabalhemos sempre!

(Fonte: "Reformador", jul./1947, p. 150)

Kunlaboris: Aymoré Vaz Pinto

## NI REKOMENDAS UTILAJN ADRESOJN

### ELDONEJO LORENZ

Lanĉoj, libroj, almanako, komunikoj  
Rio de Janeiro, Brazilo  
[www.editoralorenz.com](http://www.editoralorenz.com)

### UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Novaĵoj, revuoj, katalogo  
Rotterdam, Nederlando  
[www.uea.org](http://www.uea.org)

### BRAZILA ESPERANTO-LIGO

Libroj, kongresoj, komunikoj  
Brasília, Brazilo  
[esperanto.org.br](http://esperanto.org.br)

### LERNU

Multlingva paĝaro por lernado  
de Esperanto  
Kursoj, gramatiko, biblioteko, forumo  
[lernu.net](http://lernu.net)

### VORTARO

Plena ilustrita vortaro de Esperanto  
[vortaro.net/](http://vortaro.net/)

### SEP MINUTOJ KUN EMMANUEL

Audioj en Esperanto  
[www.portalser.org/other-languages/7-minutes-with-emmanuel/esperanto/](http://www.portalser.org/other-languages/7-minutes-with-emmanuel/esperanto/)

### ESPERANTO ESTAS...

Videoj pri la universala lingvo  
[esperantoe.blogspot.com.br](http://esperantoe.blogspot.com.br)

### PRELEGO DE ZAMENHOF EN LA 1-A MONDA KONGRESO DE ESPERANTO EN FRANCA BULONJO (1905)

[upload.wikimedia.org/wikipedia/commons/d/d8/Bulonjaprelego.ogg](http://upload.wikimedia.org/wikipedia/commons/d/d8/Bulonjaprelego.ogg)



## INFANOJ KAJ ADOLTOJ

## CRIANÇAS E ADULTOS

(Célio Freitas Martins)

Infanoj kverelas, sed forgesas,  
Ne konservas rankoron en animo.  
Sed multe aliiĝas, kiam kreskas,  
Frustracioj kaj traŭmoj en senfino.

Benataj estu la pacsemantoj,  
Humilaj, simpluloj, pardonemaj,  
La mildaj, paciencaj, bendisdonaj,  
Tiel instruis Li siajn disĉiplojn.

La korpuraj mian benon havu,  
Lasu al mi veni la infanetojn,  
Al vi ili instruu ĝustan vojon.

Sed infanoj kreskas, jen ŝanĝiĝo,  
Lernas hipokriti kaj korupti,  
Ignoras sian fraton dum satiĝo...

Crianças desentendem, mas esquecem,  
Não guardam rancor em suas almas.  
Mas se modificam quando crescem,  
Acumulam frustrações e traumas.

Bem-aventurados os pacíficos,  
Os humildes, os simples, que perdoam,  
Os mansos, os pacientes, que abençoam,  
Assim falou Jesus a seus discípulos.

Os limpos de coração, benditos sejam,  
Deixai vir a mim as criancinhas,  
Aprendei com elas o caminho.

Mas a criança cresce e desnatura,  
Aprende o falso e o descaminho,  
Alheia-se do irmão em sua fartura...



## EL LA EVANGELIO OBEEMO KAJ REZIGNACIO

“Feliĉaj estas la humilaj, ĉar ili heredos la teron. Feliĉaj estas la  
pacigantoj, ĉar filoj de Dio ili estos nomataj”. – Mt 5:5 kaj 9

**L**a doktrino de Jesuo instruas ĉie la obeemon kaj rezignacion, du virtojn kunirantajn kun dolĉeco kaj tre viglajn, kvankam la homoj erare ilin konfuzas kun la negacio de la sento kaj de la volo. La obeemo estas la konsento de la racio; la rezignacio estas la konsento de la koro; ambaŭ estas agantaj fortoj, ĉar ili portas la ŝarĝon de la provoj, kiun la malprudenta ribelo igas la homon delasi. La malkuraĝulo ne povas esti rezignaciema, same kiel la fierulo kaj la egoisto ne povas esti obeemaj. Jesuo estis la enkorpiĝo de tiuj virtoj malŝatataj de materialistaj antikvuloj. Li venis en la momento, kiam la roma socio estis pereanta en la svenoj de la koruptado; li venis, por briligati en la sino de la senfortiĝinta homaro la venkojn de la sinofero kaj de la karna rezigno. [...] (Lazaro. Parizo, 1863.)



(KARDEC, Allan. “La evangelio laŭ spiritismo”. El la franca lingvo tradukis Ismael Gomes Braga. Rio de Janeiro: Brazila Spiritisma Federacio, 2008. ĉap. 9 – Feliĉaj tiuj, kiuj estas mildaj kaj pacamaj. § 8 – Obeemo kaj rezignacio.)

**“La interna ideo de Esperanto estas la animo, la lingvo estas la korpo. Same kiel korpo ne vivas se la animo ĝin forlasas, tiel same la lingvo ne vivas sen la interna ideo. Ni ne kredu, ke ni povos konduki al la fina venko tiun korpon sen animo”.**

Délio Pereira de Souza  
Fondinto de Eldonejo Lorenz



# ELDONEJO LORENZ KAJ ALMANAKO LORENZ ĈIRKAŬ LA MONDO



“Oni ofte pensas, ke religiuloj kaj aparte spiritistoj estas kreduloj kaj revuloj tute ne taŭgaj por la reala mondo. Tamen la laboro de Eldonejo Lorenz dum 41 jaroj pruvas la malon. Sufiĉas rigardi la katalogon por kompreni kiom da fruktoj donis tiu laboro. Kaj se hodiaŭ oni trovas spiritistojn en Italujo aŭ en Hungarujo aŭ eĉ en Ĉinujo, malantaŭ tio staras Eldonejo Lorenz kaj ĝia laboro per Esperanto. Utiligi Esperanton por disvastigi informojn pri Spiritismo estis

grandioza ideo, ĉar per Esperanto oni atingas sekciojn de la socioj, kiuj estas tre pli malfermitaj al novaj informoj. Kaj certe Spiritismo bezonas tiun malfermecon, ĉar en la plej multaj socioj ekster Brazilo oni ne prezentas Spiritismon aŭ rekte misprezentas ĝin.

Krome, la laboro de Eldonejo Lorenz aparte riĉigis la kulturon de Esperanto. Sen la informoj pri Spiritismo, pri Oomoto aŭ pri la bahaanoj, la kulturo

de Esperanto estus multe pli malriĉa. Finfine la movado por Esperanto estas parto de ĉi tiuj movadoj, kiuj provas plibonigi la mondon. Mi ne indas mem iĝi spiritisto, ĉar mi estas homo tro ligita al la materia mondo, sed mi ja posedas multe pli da informoj pri Spiritismo ol la grandega plejmulto de la eŭropanoj.

Dankon, Eldonejo Lorenz, pro via laboro!”

Renato Corsetti

Se la karaj gelegantoj de “Komunikoj”, ekzster Brazilo, volos tute senpage ricevi ekzempleron de Almanako Lorenz, sendu al ni vian poŝtadreson kaj kun granda ĝojo vi ĝin ricevos.

“Mi persone ŝuldas mian unuan konscian kontakton kun la mondo de spiritaj estuloj al brazilaj esperantistoj-spiritistoj dum mia laboro en “Bona Espero” en 1977. Do mi duoble bonvenigas la laboron de esperantistoj-spiritistoj en produktado de la belaspekta kaj interesa Almanako Lorenz.”

Trevor Steele

## RETROVI LA VOJON Suso Moinhos

Retrovi la vojon al vi estas mistera tasko  
nur plenumebla de birdoj manĝantaj panerojn  
aŭ de talpoj tunele ligantaj niajn grotajn timojn

Mi asertas ke mi ne plu fidus la tempon  
en la horloĝo de la merloj apud-alnaj  
ĉar mi havas horojn el materio intensa  
eble drata aŭ fera sed neniel fadena  
por vin trovi okul-en-poŝe en la buksa labirinto  
gvidate nur de pulmokompaso

Mi nun serĉas la vorton unuan, la primaran voĉon  
por fondi poemon zigzage inter nomoj konataj  
kvazaŭ ŝtonan pragraĵon en montopinto  
atende pretan por ĉiaj interpretoj

Senpere mi provas rekovri  
per teksita nebulo la krion kuŝantan  
tertavole sub ĉiu verso  
por ke vi ne aŭdu la sonojn rivelajn  
kaj min sekvu

(El la poemaro “Laminario” - eld. Espero, 2016)